



Estrara Komunikado EKO 2015-52 sendita el Budapeŝto, la 23an de decembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.

Seminario pri Aktivula Maturigo (SPAMO 17)

Eger, Hungario, 28-31 dec. 2015, ĉiumatene tra tri horoj (kun paŭzeto) ekde la naŭa horo.

Temo: Junigi la Komunumon

Celoj:

- Ekkoni kaj bonigi la situacion de la movado en la landoj de la Sud-Orienta Regiono de Eŭropo (SORE)
- Formuli strategiojn por altiri pli da junaj membroj al UEA kaj TEJO.
- Proksimigi la kunlaboron inter TEJO kaj UEA en la kampo de membrovarbado.

Programo laŭtaga

Gvidanto de TEJO: Enric Baltasar (EB), Oliva (apud Valencio), Hispanio

Gvidanto de UEA: Stefan MacGill (SMG), Budapeŝto, Hungario

Tago 1 – analizo de la situacio (merkredo)

Sinprezentoj, aŭdo de raportoj el unuopaj landoj. HU, PL, UA, RO, RS, BG...

Diskutoj pri la aŭditaj raportoj, eble parte en grupoj

Hejmtasko ☺ Surbaze de raportoj, faru FLAM-analizon pri la regiono:

Fortoj: De la landaj kaj lokaj grupoj kaj unuopuloj – do, la komunumo.

Lamaĵoj: Kio nebone funkcias en la komunumo?

Avantaĝoj: Kiuj faktoroj en la socio favoras la disvastigon de Esperanto?

Minacoj: Kiuj faktoroj malfavoras kaj obstaklas tiun disvastigon?

Tago 2 – solvoj por la regiono (ĵaŭde)

Raportado pri la intertempe farita FLAM-analizo. Pluiri al solvoj laŭ formulo EKEK:

Fortoj: Kiel **evoluigi** ilin kaj protekti ilin?

Lamaĵoj: Kiel **kuraci** aŭ mildigi tiujn mankojn?

Avantaĝoj: Kiel **ekspuati** ilin pli efike kaj plene?


Minacoj: Kiel **kontraŭi** aŭ preteriri la bremsojn?

Laborado en etaj grupoj (laŭlande?). Kreo de planoj, ankaŭ por kunlaboro.

Tago 3 – solvoj por TEJO/UEA (vendrede)

Enkonduko – laŭ la temaro de la artikolo en revuo *Esperanto* (nov 2015). Resume:

Nur 8% de la membraro de UEA/TEJO estas malpli ol 30-jaraj kaj 25% malpli ol 50-jaraj. 25% estas pli ol 73-jaraj., kaj 8 % pli ol 82-jaraj.



Grupo SMG (UEA kaj TEJO)

1. Kiel evoluigi pli dinamisman programon de membrovarbado en UEA kaj TEJO?
2. Kiel altigi la proporcion de membroj forlasantaj TEJO-aĝon resti ĉe UEA?
3. Kiel pli bone konvinki TEJO-aktivulojn ekaktivi iel en UEA?

Grupo EB (unuavice pri TEJO):

1. Duono de la membraro de TEJO estas plene nova en difinita jaro. Sed alia duono forlasas la Organizon (plejparte antaŭ la aĝo 30). Kiel reteni pli bone la membrojn?
2. La landa agado ĉe TEJO estas malforta punkto. Nur manpleno da sekcioj bone funkcias. Aliaj ripozas, aliaj mortis plene. Elpensu strategion reveki dormantojn?
3. Kiel kapti kaj retenigi finintojn de retaj kursoj?

Fine, kuna sesio: (SMG+EB)

1. Kiel UEA kaj TEJO pli bone kunlaboru ĝuste pri SORE?
2. Kion faru TEJO, kion faru UEA por helpi al la regiono SORE progresi?

Tago 4 – konkludoj (sabate)

Aŭdo de konkludoj kaj planoj, precipe pri la tria tago.

Kompilo de rekomendoj – al UEA, al TEJO, al landoj de la regiono.

Eventuala formiĝo de laborgrupoj por agi post la seminario.

Pritakso (parole kaj skribe), ĝisoj kaj kisoj.

Aktivula Maturigo: seminario 18

Temo: Kiel organizi E-vojaĝojn kaj turismajn ekskursojn

memore al **Andreo Grzębowski**

Kadre de **POLUDNICA 2016**

PROGRAMO

6. 1. 2016, merkredo, ne okazos programo de AMO

De la 16-a funkcios akceptejo

19.00 – solena malfermo en Civita domo en Závažná Poruba kun Akcepto de la vilaĝestro – Ing. Pavel Beřko

7. 1. 2016, ĵaŭdo

9.00 – 12.00 AMO seminario, kune kun kafpaŭzo meze.

- Enkonduko – Stefan MacGill
- Vojaĝanto kaj organizanto Andreo Grzębowski – Stanislaw Mandrak
- Diferencoj inter vojaĝoj organizitaj de vojaĝoficejoj kaj de esperantistoj – Ján Vajs
- Kiel vojaĝi malmultekoste – Dorotka Rodzianko
- Pretigo de vojaĝoj – Vesna Obradovič
- Bonaj kaj malbonaj spertoj el organizado de turismaj aranĝoj – Petr Chrdle

14.00 – 17.00 Ekskurso al la Muzeo de Milan Rúfus..

19.00 – 21.00 Prelegoj:

Vojaĝantoj kaj turistoj en la jaro 2015 – Ján Vajs

Mia biciklado aŭ kiel mi atingis praarbaron - Karel Votoček

Britaj insuloj – Vladimír Škuta,

Triglav – Mária Minichová,

Unua duonfinalo de geografia kvizo – Michal Matušov

8. 1. 2016, vendredo

Tage: ekskursoj

19.00 – 21.00 Daŭrigo de AMO-seminario

- Organizado de E-vojaĝoj al malproksimaj landoj – Alexander Zdechlik
- Preparo de geografiaj kvizoj kaj Dua duonfinalo de geografia kvizo – Michal Matušov

Pesado de ŝtonoj por Esperanto-obo, informoj por supreniro sabata, pri naĝado kaj aliaj ekskursoj.

9. 1. 2016, sabato: ne okazos programo de AMO

09.00h Tuttaga ekskurso

20.00 – Popola ensemblo Poludnica, finalo de geografia kvizo, rezultoj de la supreniro.

10. 1. 2016, dimanĉo

9.00 – 12.00 Konkludo de la AMO-seminario – Stefano MacGill. Forumo, Pritakso. Formulado de rekomendoj por i.a.: Landaj Asocioj, Fakaj Asocioj, UEA, TEJO, E-centroj...

Geografia lingva kurso II-a parto – Magda Feifičová. ttt-paĝo de Poludnica. Vojaĝaj kaj turismaj programoj por la jaro 2016. Ekskursoj dum la 101a Universala Kongreso en Nitro (antaŭkongresa, dumkongresaj kaj postkongresaj).

Vortoj: 740

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...